

Dimanĉo la 31an de januaro 2010

Rovigo- Maria Centro

Apokalipso: Preparo al la nupto

Biblia kurso de Ricardo M. Pérez Màrques

Ricardo M. Pérez Màrquez, fondinto kun Alberto Maggi de la Centro pri Bibliaj Studoj "G. Vannucci" en Montefano - Macerata (www.studibiblici.it) gvidis biblian dutagan kurson ĉe la Maria Centro "Beata Dolora Dipatrino" en Rovigo. La kurso okazis dum du tagoj, la 23an kaj la 24an de januaro 2010, kaj temis pri la libroj de la Apokalipso, pritraktante la temon de la Beatproklamoj en la Apokalipso kaj fiksante la paroladon sur la klarigo de la partoj rilatantaj la ekleziojn el Efeso, Latakio kaj Izmiro. La kurso provizis kelkajn gvidliniojn por la legado de la libro; Apokalipso ne estas libro pri la atendindaj katastrofoj, ĝi ne donas la nombron de la savotaj homoj aŭ de la damnotaj homoj, ĝi ne priparolas la mondfinon, sed ĝi klarigas la sencon de la historio kaj la manieron laŭ kiu Dio ĝin plenumos. Oni povas diri ke la Apokalipso ne pritraktas la mondfinon, sed la celon de la historio, de la historio vidita laŭ la vidpunkto de Dio, Jesuo estas la sola homo inda rivelacii la diajn decidojn pri la sorto de la mondo, ĉar Li estas prezentita sub la ŝajno de buĉita ŝafido kaj nomita per la samaj nomoj de Dio en la Malnova Testamento.

Dum la rakonto de la libro Genezo montras la perditan Paradizon, la Apokalipso pritraktas la retrovitan Paradizon, la paradizon kiu ne estas komprenata kiel lokon sed kiel komunecon; la propono de intimeco ne plu estas "ĝardeno" sed ĝi estas "nupto"; al tiu ĉi "nupto" la homaro ekpaŝas. La libro Apokalipso ne konas la tempofinon, sed ĝi certas pri la fideleco de Dio. Pere de la jam pasinta historio de la popolo ĝi malkovras la daŭrajn aĵojn de la agado de Dio kaj ĝi antaŭen projekcias tiujn ĉi daŭrajn aĵojn. La "malforteco" de la ŝafido venkas, kaj la "forto" de la drakoj kaj de la leonoj malvenkas. Jesuo, la ununura vera revelaciinto de la Patro, montris al ni ke la eternaj amo kaj bonvolemo de Dio al ĉiu homo estas la motoro de la historio kaj beataj estas tiuj kiuj kundividas kun Dio ĉi tiun unuan amon per reciprokaj servo kaj bonvolemo. Apokalipso, kiel ĉiuj libroj de la Nova Testamento, estis verkita en la greka lingvo kaj ne en la hebrea lingvo aŭ en la aramea lingvo, kiel opinias kelkaj homoj. La teksto en la origina lingvo de la Nova Testamento kaj, do, de Apokalipso restis netrovebla dum jarcentoj, kaj ĝi estis anstataŭigata de la latinaj tradukoj. La teksto, reakirita kaj legata en la origina lingvo, donas al ni nerekonablajn kaj ne utiligeblajn legŝlosilojn por la tradukitaj versioj kaj, do, ĝi enkondukas nin laŭ kuntrena maniero en la senfinan kaj decidigan riĉecon de la Bona Novaĵo. Kiu ajn aŭdas priparoli Apokalipson laŭ tiuj novaj vortoj, tiu sin

trovas unuflanke konfuzita de la ŝablonaj diroj, kaj aliflanke li komencas ekrimarki malkaŝitan, luman kaj eternan vivopadon (Apokalipso signifas ĝuste malkaŝita). La salono por la prelegoj ĉe la monaĥinoj Servistinoj de Maria estis plenŝtopita de la aŭskultantaro kaj la preĝejo por la Sankta Meso je la deka horo matene en dimanĉo la 24a estis plenplena je homoj. Tio substrekas ke oni soifas je la bona novaĵo de la Evangelio kiu tiom pli estas malsoifiganta kiom ĝi ĉerpas el la originaj fontoj kaj ĝi estas kompetente prezentita.

[Ni devas esti dankemaj al la monaĥinoj de la Maria Centro kiuj en siaj aktivadoj estis vivtenantaj tiun ĉi jaran rendezuon kun fakuloj pri Bibliaj Studoj, kiu denove okazos la venontan jaron la 29an kaj 30an de januaro 2011. Intertempe estas antaŭviditaj aliaj gravaj iniciatoj inter kiuj ni rememoras la celebradon de la 105a datreveno de la miraklo de la bildo de la Dolora Dipatrino kun la ĉeesto de la abato de la Servistoj M. Ruiz Carnica, kiu okazos la unuan de majo ĉi jare.

(<http://servedimaria.diocesi.rovigo.it>).